
# *MODIFITA HELP-ALFABETO*

el la Fundamenta Help-Alfabeto




**Grafikon konceptis:**
*Jean DOUBLET*



## Th. Fontane kaj H. Mann en la lukto kontraŭ naturalismo ĉe la limo de jarcentoj

Avagjan Tatjana IVANOVNA (RU)

La lukto por la nova realisma arto en Germanio en la lasta kvarono de la XIX-a jarcento estis senkompata. En la dua duono de la 80-aj jaroj la naturalismo komencis okupi regantan pozicion en la germana literaturo, aparte en dramverkaro, altirante al si multajn talentajn kaj serĉantajn verkistojn. La naturalismo iĝas tiom grava faktoro de germana kulturo, ke nek kritiko (marksisma same kiel alia) nek verkistoj mem povis ignori ĝin. La verkistoj aŭ serĉis en naturalismo la konfirmon de siaj ideoj aŭ polemikis kontrau ĝin. Por la germana literaturo de tiu epoko naturalismo estis de multaj vidpunktoj paŝo antaŭen kaj ĝi iĝis grava etapo en la formiĝo de kritika realismo de la XX-a jarcento.

Komplikaj estis la rilatoj inter la naturalistaj verkistoj kaj la verkistoj de kritika realismo, flanke kaj de la malnova generacio (Th. Fontane) kaj de la juna generacio (H. Mann kaj Th. Mann). Dum du jardekoj, ĝis somero 1890, Fontane publikigis en "Vossische Zeitung" siajn recenzojn pri la unuaj spektakloj de la reĝa drama teatro kaj de "Libera Scenejo". En siaj recenzoj li batalis por la realisma arto. Iomete post iomete Fontane iĝis unu el la plej famaj teatrokritikistoj de sia epoko. Liaj opinioj pri teatro estis kompletigitaj de multaj artikoloj kaj esploroj pri literaturo, en kiuj liaj postuloj de realismo ĉiam estis ligitaj kun la intereso pri la tutmonda literaturo kaj malakcepto de provinca limigiteco.

Ankoraŭ dum lia vivo la verkaro de Fontane iĝis argumento en la polemiko inter naturalistoj (O. Brahm, G. Alberti, K. Bleibtreu) kaj neoklasikistoj. Otto Brahm[1] konsideris Fontane kiel naturaliston, ĉar li subtenis la serĉojn de "Libera Scenejo" en la lukto por la nova arto kaj salutis la verkojn de Ibsen kaj Hauptmann. La verkoj de Fontane, kiuj aperis en la 80 - 90aj jaroj ("Pekulino", "Vojoj kaj krucvojoj", "Stine"), montris Fontane, laŭ

la opinio de la kritikisto, de tute nova vidpunkto - kiel naturaliston, homo de "Libera Scenejo". La estetika bazo por tiu opinio de Otto Brahm estis la versimileco de ĉiutaga koloro en la verkoj de Fontane, lia rifuzo de dinamika evoluo, de komplika kompozicio. Neniu el samtempuloj, substrekis la kritikisto, pentris la vivon pli versimile ol Fontane. Priskribo de la ĉiutaga vivo, de la vivkondiĉoj kaj de la moroj predominas en la romano "Familio Poggenpulh", pro kio kelkaj kritikistoj klasifikis la romanon inter naturalismaj verkoj.[2]

Estas vero, ke Fontane aprobis la unuajn paŝojn de naturalistoj. Li kiel unu el la unuaj salutis junan Hauptmann vidante en li grandan esperon de realisma arto: "Mi trovas en liaj verkoj ne nur la veran tonon, sed ankaŭ la veran kuraĝon, kaj krom la vera kuraĝo - ankoraŭ la veran arton. Ĉio, kio delonge mirigas min en la verkoj de Ibsen: mergiĝo en la vivon, kapablo doni karakteristikon, ĉion tion mi retrovas nun en la verkoj de Hauptmann".[3] Kiam P. Heyse atakis naturalistojn, kulpigante ilin pro malalta artnivelo, Fontane skribis pri la teatraĵo de Hauptmann "Antaŭ sunleviĝo": "Estas sensencaĵo vidi en naturalisma simpleco la foreston de arto. Inverse, se ni bone rigardos (pri kio, evidente, ĉiam eblas diskuti), ĝi estas ĝuste la signo de vera arto".[4]

La verkisto akre sentis la krizon de la malnova mondbildo. Li interesiĝis pri demokratiaj socitavoloj. Tio kondukis lin al la avangardaj fortoj de lia epoko. Li vidis en naturalistoj, kiuj serĉis novajn metodojn por prezenti la veron de la vivo, la forton kapablan doni novan stimulon al la evoluo de la arto en la fino de la XIX-a jarcento. Li vidis kaj akceptis sukcesojn kaj atingojn de la nova tendenco, sed samtempe li bone vidis la diferencon inter siaj propraj verkoj kaj la verkoj de naturalistoj.

"Mi ege interesiĝas pri evoluo de la nova skolo, pri kio mi parolis kaj en privataj leteroj kaj publike. Sed mi mem ne povus lukti kune kun ili kaj partopreni iliajn batalojn kiel marioneto. (...) Mi ne mirus, se Frenzel, Spielhagen, Heyse min konsideras kiel neoficialan ĉefon. Tio estas la plej terura afero. Mi povus kun



granda bruo eniri la novan skolon, de morala vidpunkto tio ne kaŭzus dubojn, sed la tuta tuno da konvinkoj mankas al mi por tio".[5]

Tiamaniere la subteno de naturalistoj ankoraŭ ne signifis por Fontane la akcepton de ilia programo. Krome, li ne akceptas unu gravan principon de naturalisma programo - preferindan intereson pri la malgajaj, ombraj flankoj de homa vivo; la strebon trovi la kaŭzojn de homa konduto nur en la biologia determinismo. Fontane akceptis la dependecon de la homo de cirkonstancoj, de medio, de liaj vivkondiĉoj. Kaj tamen li ne povis vidi en la homo nur liajn fiziologiajn instinktojn kaj trakti lin kiel produkto de heredeco, ĉar tiu vidpunkto eligas la liberon de elekto kaj agoj, kaj la sorto de la homo estas determinita anticipe.

En la verkoj de Fontane la medio aperas kiel sintezo de sociaj, ĉiutagecaj kaj psikologiaj elementoj. Detala priskribo de la medio, kiu estas karaktera trajto de lia verkmaniero,[6] por li ne estas la celo, sed la metodo de konkreta historia analizo de la nuntempeco, esprimo de tio nova, kiu aperis en ĝi. La medio kaj la ĉiutaga vivo de homoj interesas Fontane, sed nur tiam, kiam ĝi iĝas soci-tipa faktoro. Fontane pravigis la principon de naturalistoj, versimile pentri ĉiutagan vivon de kamparanoj, de simplaj homoj, kiuj havas nenion eksterordinaran. "Ĉion, kion ni havas en la vivo, ni devas, verŝajne, havi ankaŭ sur la scenejo".[7]

En sia polemiko kontraŭ la naturalistoj Fontane kritikis ilian "malgajan amon al ĉio malgaja". "Se la naturalismo volas venki siajn malamikojn, se ĝi volas vivi, ĝi devas rezigni de tiu tendenco" skribis li.[8]

Por Fontane la enhavo de realisma arto estas difinita antaŭ ĉio de ĝia sana interna esenco, ĝia natura inklino al la beleco, poezio, paco kaj paciĝo".[9] Fontane kritikis Zola-on - malgraŭ la tuta sia estimo por li - ĝuste pro tio, ke Zola prefere interesiĝis pri ĉiuj malaltaj homaj pasioj, pri malbeleco kaj malagrablaĵoj de la vivo, li evidente troigis tiun tendencon en la verkoj de Zola. Fontane skribis: "Li estas granda talento, sed negaja. Aparte atentindaj estas

liaj ŝercoj: estas eĉ nek unu spuro de senmoraleco aŭ eĉ frivoleco, apenaŭ vi trovos ion de cinikismo, sed li vidas la vivon kaj la arton tute malnoblajn. Tamen, la vivo ne estas tia, kaj eĉ se ĝi estus tia, necesus fari klerigantan kurtenon de beleco; sed nenion necesas krei, la beleco ekzistas, necesas nur havi okulojn por vidi ĝin. La vera realismo estas ĉiam plena de beleco, ĉar la beleco, dank' al dio, same kiel la malbeleco, estas parto de la vivo mem".[10] Li opinias, ke la tasko de vera arto estas montri "la vivon pli helan, sed ne deformitan".[11]

La arto, kiu ne havas profundan socian enhavon, estas neakceptebla ankaŭ por H. Mann, kiu estis sub influo de Fontane. H. Mann komencas publikigi siajn verkojn en 1900-aj jaroj kaj li daŭrigas multajn tradiciojn de Fontane. Same kiel Fontane, li singarde rilatas al la naturalismo. H. Mann malakceptas la naturalisman estetikon. En la 8 ĉapitro de "La Promesita Tero" la verkisto parodias la naturalisman dramon, aparte la dramon de Hauptmann "La Teksistoj". En la dramo "La Venĝo", kiu montras la ribelon de malsataj laboristoj kontraŭ siaj ekspluatantoj kaj mastroj, abundas epizodoj, gustantaj je kruelo kaj volupto. Same kiel Fontane, H. Mann strebas al la vero en la arto, kaj same kiel por Fontane, por li tio neniam signifis nur penetri en la malhelajn profundecojn de la vivo, vidi nur kruelon kaj malbonaĵojn de la socia vivo, preferi malaltajn homajn pasiojn, malbelajojn kaj malbonaĵojn de la vivo. H. Mann kredis je humana esenco de la homo, je liaj kapabloj lukti kontraŭ la malbono por la altaj idealoj. H. Mann opiniis, ke humana esenco de verkisto estas servado al la popolo, ke li devas lukti por la socia justeco. La literaturo kaj la politiko devas marŝi kune. H. Mann proklamas la idean arton pentrantan verece la burĝan socion. Li opinias, ke la grandaj verkistoj de la XIX-a jarcento estis modeloj de tiu verkado. Li citas nomojn de verkistoj, plej proksimaj al li, kiel Keller, Fontane, Stendhal, Flaubert, France et L. Tolstoj.[12]

Poste li parolas kun aparta estimo pri Zola, kies verkaron li analizas en la evoluo: de senpasia historiisto de la burĝa mondo, unu el la kreantoj de naturalismo, ĝis batalanto por la socia justeco, kiu anoncas la pereon de burĝa mondo, kaj ĝis vera realisto. "Li ne nur kreis verkojn, sed li same konfirmis la veron. La vero estis la animo de liaj verkoj."[13] De la komenco de sia verkado, en la atmosfero de estetikaj bataloj, H. Mann, liberiĝante de siaj iluzioj, strebas respondi al la postuloj de reala vivo, prilumigi la ĉefajn tendencojn de sia epoko kaj la sociajn ŝanĝojn. Lia lukto kontraŭ naturalismo kaj dekadencaj tendencoj stimulas liajn serĉojn, helpas trovi sian verkmetodon kaj sekve favoras la pliriĉigon de realisma arto de la XX-a jarcento.



Avagjan Tatjana IVANOVNA
d-rino pri filologio
Baŝkiria Ŝtata Universitato
UFA
RUSIO

---

1 Brahm O., Kritiken und Essays, Zürich und Stuttgart, 1964. Alberti G., Theodor Fontane, "Die Gesellschaft", 1889/54. Bleitreu K., Die Revolution der Literatur, Leipzig, 1886.

2 Schleuter - in "Th. Fontanes Romane und Erzählungen in 8 Bänden", Bd. 7, Berlin Weimar, 1969, S. 594-595.

3 Fontanes Werke in 15 Bänden, Bd. 1, Aufbau-Verlag, Berlin-Weimar, 1964, S. 355.

4 Same, S. 353.

5 Fontanes Briefe in 2 Bänden, Bd. 2, Berlin-Weimar, 1968, S. 287.

6 Pri tio parolis Otto Brahm en unu el siaj artikoloj pri la romano "Neriturnebla".

7 Ausgewählte Werke Th. Fontanes in 5 Bänden, Bd. 5, Hrsg. von Brende, Stuttgart, 1944, S. 102.

8 Fontane Th., "Schriften zur Literatur", Berlin, 1960, S. 215.

9 Fontane Th., "Schriften zur Literatur", Berlin, 1960, S. 108.

10 Fontanes Briefe in 2 Bänden, Berlin-Weimar, 1968, Bd. 2, S. 105-106.

11 Fontane Th., "Plaudereien über Theater", Hrsg. von Th. Fontane, Berlin, 1926, S. 416.

12 Mann H. 1871/1880, Werk und Leben in Dokumenten und Bildern, Berlin-Weimar, 1977, S. 35.

13 Mann H., Verkoj en 8 vol-oj. Moskvo, Hudojestvennaja Literatura, 1958, p. 102.